Friedrich Wilhelm Weber,

Dektritilio, ĉapitro 2, La monaĥejo

tradukita de Manfredo Ratislavo

1 Dolĉa kanto de l' alaŭdo,
sur la montoj brila helo!
Kaj tra ĉiuj valoj blovas
mola vento de degelo.

2 Gaje saltis rivereto j
en la valojn de la montoj,
la plaŭdado de la akvoj
sonis kvazaŭ sonĝrakontoj;

3 pezaj sonĝoj kaj rakontoj
pri de l' elfoj frosttremado,
pri ronkado de l' gigantoj,
pri de l' nanoj babilado.

4 Ĉar la nego jam degelis,
blovis jam varmeta vento,
susuradis arbopintoj
en printempa antaŭsento.

5 El la verdaj arbopintoj
jen elstaris la frontono,
tur' kaj first' de monaĥejo
Benedikta en la fono.

6 Ĵuse saĝaj viroj venis
tien ĉi al la paganoj,
kun benvortoj sur la lipoj
kaj pacsignoj en la manoj;

7 kun armilo pia, kiu
malfortulojn kuraĝigas,
kiu venkas la popolojn
kaj venkinte liberigas;

8 Seriozaj viroj, kiuj
en mondmalestimo dura
sin dediĉis al preĝado,
laborad', pensado nura;

. . .

Friedrich Wilhelm Weber,

Dreizehnlinden, Kapitel 2, Das Kloster

1 Süßer Schlag der Heidelerche,
Sonnenschein auf allen Hügeln!
Tauwind sang, durch alle Schluchten
Flog er rasch auf weichen Flügeln.

2 Lustig hüpften alle Brunnen
Aus den Bergen durch die Bäume,
Um im Tale zu erzählen
Ihre langen Winterträume;

3 Schwere Träume und der kleinen
Zarten Elben frost'ges Schaudern
Und der Riesen lautes Schnarchen
Und der Zwerge kluges Plaudern.

4 Denn der Schnee begann zu schmelzen,
Bräunlich stand des Berges Gipfel,
Und ein Frühlingsahnen rauschte
Durch die grünen Tannenwipfel.

5 Aus den Tannenwipfeln ragte
Eines Türmleins spitzer Kegel,
First und Giebel eines Klosters
Nach Sankt Benediktus' Regel.

6 Jüngst erst waren weise Männer
Angelangt aus fremden Reichen,
Segensworte auf den Lippen,
In der Hand des Friedens Zeichen;

7 In der Hand die fromme Waffe,
die mit Mut beseelt den Schwachen,
Die durch Huld besiegt die Völker
Und besiegt, um frei zu machen;

8 Ernste Männer, vielgeprüfte,
Die in harter Weltverachtung
Einsam sich der Arbeit weihten,
Dem Gebet und der Betrachtung;

. . .

9 pacaj viroj sovaĝejojn
ekkulturi klopodantaj,
kaj animojn tre sovaĝajn,[4]
novan kredon dissemantaj.

10 Saĝe kaj senlace ili
konstruadis per segilo,
nivelilo, lod', martelo,
adzo, trulo, mezurilo,

11 ĝis elkonstruitaj estis
per diligentec' ilia
domo kaj preĝejo firme
de l' konvent' Dektritilia.

12 En malriĉo kaj trankvile,
discipline, obeeme
la arbegojn ili hakis
kaj fiherbojn laboreme.

13 faris ili kontraŭ aproj
remparaĵojn latbarilajn,
por kreskigi en la valo
verdajn spikojn homutilajn;

14 endevigis la riveron
en plektaĵon kaj en digojn,
greftis ili sudajn plantojn
sur acerbajn nordajn tigojn.

15 Forte kreskis en ĝardeno
roz', serpin', akvilegio,
spicanet', api', lavendo,
abrotano kaj salvio.

16 Kroma grundo kulturenda
estis, riĉa kaj profunda,
malfacile kulturebla,
tre sovaĝa, sed fekunda.

17 Vere oni devis multon
ja kultivi kaj eltiri,
la fiherbojn kaj grimptigojn
elsarkadi kaj elŝiri!

. . .

9 Stille Siedler, die sich mühten,
Mit dem Spaten wilde Schluchten,
Wildre Herzen mit der Lehre
Lindem Samen zu befruchten.

10 Klugen Sinns und unverdrossen
Bauten sie mit Lot und Waage,
Winkelmaß und Säg' und Hammer,
Axt und Kelle, Tag' auf Tage,

11 Bis es ihrem Fleiß gelungen,
Haus und Kirche fest zu gründen,
Bis der Brunnen rauscht' im Hofe
Des Konvents zu Dreizehnlinden.

12 In Gehorsam, Zucht und Armut
Schafften still die tapfern Streiter:
Reuteten des Urwalds Riesen,
Dorn und Farn und wüste Kräuter;

13 Zogen Wall und Zaun und Hecke,
Hirsch und Keiler abzuwehren,
Daß im Tale wohlumfriedet
Grünten menschenholde Ähren;

14 Zwängten ein den ungestümen
Strom durch Pfahlgeflecht und Dämme,
Propften milde Südlandsreiser
Auf des Nordens herbe Stämme.

15 Kräftig sproß im jungen Garten
Akelei und Ros' und Quendel,
Blasse Salbei, Dill und Eppich,
Eberraute und Lavendel.

16 Aber noch ein andrer Acker
Blieb den Vätern: reicher Boden,
Tiefer Grund, doch schwer zu bauen
Und voll heidnisch wilder Loden.

17 Traun, da gab es viel zu rupfen,
Viel zu zähmen und zu zanken,
Viel zu zerren und zu zupfen
An den ungezognen Ranken!

. . .

[4] aŭ pli konforme al la originalo: kaj animojn pli sovaĝajn,

18 En lernejo la idaro
Saksa sidis klerigenda;
laborego estis tie
por ĉi tiuj ja farenda.

19 Estis esplorenda sorĉo
de l' romiaj runoj jena;
solvi tion estis tasko
kaj enigmo dornoplena!

20 Poste plaĉa kopiado
de l' literoj manskribitaj,
alta cel', nur atingebla
por disĉiploj plej elitaj!

21 Sed plej malfacile estis
ja, klarigi al kredontoj.
La mesaĝon de la kruco.
Dia vort', hero-rakontoj,

22 bonaj Kristo kaj Balduro,
la anĝeloj, elfoj helaj
ŝajnis al flavhararuloj
kelkaj esti same belaj.

23 Nur lernantoj pli talentaj
estis plie edukataj,
kaj la sep liberaj artoj
al ĉi tiuj instruataj.

24 Estis de l' germana lingvo
sonoj pezaj, malgracilaj,
kiel la unuaj paŝoj
de infano malfacilaj.

25 Flugis kvazaŭ sagrapide
de la Romianoj vortoj,
tranĉis akre kaj metale
kiel la armeaj fortoj.

26 Akron ili donis ja al
logikaĵoj, interpretoj,
plenon, forton al retoroj,
rimojn, ritmojn al poetoj.

...

18 Auf den braunen Eichenbänken
Saß die Brut der Sachsenrecken,
Junge Bären; Riesenarbeit,
War's, sie bildend zu belecken.

19 Erstlich galt's, der Römerrunen
Fremden Zauber zu ergründen:
O ein dornenvolles Rätsel,
Dessen Lösung kaum zu finden!

20 Dann gefällig nachzubilden
All die wunderlichen Zeichen:
Hohes Ziel, nur auserwählten
Fingerkünstlern zu erreichen!

21 Doch am schwersten war's, des Kreuzes
Milde Botschaft zu erklären,
Denn gar manchen Flachskopf dünkten
Gotteswort und Heldenmären,

22 Weißer Christ und weißer Balder,
Lichte Engel, lichte Elben,
Jüngerschaft und Heerbannstreue
Ganz dasselbe, ganz dieselben.

23 Nur begabtre Schüler wurden
Höhern Zwecken zugeleitet
Und die sieben freien Künste
lehrhaft ihnen ausgedeutet.

24 Schwer und ungelenkig waren
Noch der deutschen Zunge Laute,
Gleich den ersten Schritten eines
Hünenkinds im Heidekraute.

25 Rasch indes wie ehrne Pfeile
Klingend flog das Wort der Römer
Von den Lippen kurz und schneidig
Wie das Schwert der Weltbezähmer.

26 Willig bot es knappe Schärfe
Logikern und Exegeten,
Kraft und Fülle den Rhetoren,
Reim und Rhythmen den Poeten.

...

27 Laŭdu la monaĥojn bravajn,
la maltimajn frokportintojn,
la de ĉiu bela scio
flegadintojn kaj gardintojn.

28 Kion en antikvaj landoj
kantis la poetoj frue,
kion pensis filozofoj
por pli posta mond' instrue;

29 kion al profetoj iam
Dia la Spirit' malkaŝis,
vortojn, verkojn de l' Di-Filo,
kiam li surtere paŝis:

30 zorgoplene kaj penege
de l' monaĥoj manskribita,
en la kestoj abatejaj
kuŝis tio konservita.

31 Ame estis rigardata
la trezoro kaj laŭdata,
kun modesta fiereco
al skribsperta hom' montrata.

32 Skribis vintre kaj somere
tion la monaĥoj piaj,
sekurigis porestonte
per laboroj tion siaj.

33 Brilis la komencliteroj
ruge, blue, verde, ore,
riĉe estis ornamitaj
per folioj kaj perflore.

34 Je la fino de la verko
petis la skribinto pia
kortuŝige, ke l' leganto
preĝu por animo lia.

35 Kiel militistoj nigraj,
runoj de l' monaĥ-kunvenoj,
staris la literoj vice
sur la blankaj pergamenoj.

. . .

27 Preis den braven, schwarzen Mönchen,
Preis den wackern Kuttenträgern,
Alles menschlich schönen Wissens
Frommen Hütern, treuen Pflegern!

28 Was auf Hellas' blauen Bergen,
Was einst am Tyrrhenermeere
Dichter sangen, Denker dachten
Später Welt zu Lust und Lehre;

29 Was der Geist geweihten Sehern
Offenbart in Sturm und Stille,
Wort und Werk des Gottessohnes,
Als er ging in Manneshülle:

30 Von der Mönche Hand geschrieben
Blatt auf Blatt mit Müh' und Sorgen,
In den Truhen der Abteien
Lag es liebevoll geborgen.

31 Zärtlich ward der Schatz betrachtet,
Mit bescheidnem Stolz gepriesen,
Und als Klosterhort dem fremden
Schrifterfahrnen Mann gewiesen.

32 Solch ein kostbar Gut zu sichern,
Treu dem künftigen Geschlechte,
Schrieben sie, die braven Mönche,
Sommertag und Winternächte.

33 Rot und blau und grün und golden
Schimmerten die Anfangslettern,
Reich umrankt von Blumendolden
Und von traumhaft bunten Blättern.

34 Rührend bat der fromme Schreiber
An des Werkes langem Ende,
Daß man seiner armen Seele
Des Gebets Almosen spende.

35 Trutziglich, wie schwarze Krieger,
Lanzenknechte der Konvente,
Standen Glied an Glied die Runen
Auf dem weißen Pergamente.

. . .

36 Estis tiuj la soldatoj,
kiuj enbatale bravis
kaj belaĵojn de l' antikvo
por la estontuloj savis!

37 Se en verso de Homero
vin ektuŝas io kanta,
iu tre profunda sento,
vin aŭskulti deviganta;

38 se la lasta romiano
vin admonas kunkolere,
ke la diojn vi honoru
kaj la virton amu vere;

39 kiam forton kaj konsolon
trovas vi en la biblio,
kiam vi jam malesperis
kaj vin refreŝigas io;

40 tiam je l' konvent-soldatoj
pensu kun memoro danka,
je l' latinaj nigraj runoj
sur la pergameno blanka! -

41 Ankaŭ la laborojn krudajn
la monaĥoj faris sperte,
lancojn, arkojn kaj hakilojn
ili sciis uzi lerte,

42 kiam estis forpelendaj
malamikoj bruligantaj
la kampfruktojn, aŭ rabistoj
donacantojn priŝtelantaj,

43 aŭ se estis en arbaro
elĉasenda por la festo
cervo dekseskorna aŭ ĉu
ulo kun harega vesto. -[5]

. . .

36 Ja, sie sind's, die schwarzen Krieger,
Die von einer weggestürmten
Schönheitswelt die letzten Inseln
Rettend vor den Wogen schirmten!

37 Weht dir aus des Mäoniden
Sängen, wie aus Meeresrauschen,
Tiefes unerkanntes Sehnen,
Das dich zwingt zum Weiterlauschen;

38 Mahnt der Zorn des letzten Römers,
Gott und Vaterland zu ehren,
Drängt er, vor dem Bild des Lasters
Dich, der Tugend anzuschwören;

39 Strömt dir aus dem Buch der Bücher
Kraft und Trost im Kampfgewühle
Wie dem matten Wüstenwaller
Aus des Palmenquelles Kühle:

40 Sei gedenk der wetterfesten
Lanzenknechte der Konvente,
Sei gedenk der schwarzen Krieger
Auf dem weißen Pergamente! -

41 Auch zu rauherm Dienste stählten
Die Geschornen ihre Kräfte:
Schicklich wußten sie zu führen
Bogen, Beil und Lanzenschäfte,

42 Waren Feinde zu verjagen,
Die des Feldes Frucht verbrannten,
Oder Räuber, die der frommen
Spendebringer Weg verrannten;

43 Oder war ein Festtagsbraten
Zu erpirschen in den Forsten,
Sei's ein stolzer Sechzehnender,
Sei's ein Bursch mit Wehr und Borsten. -

. . .

[5] Tio estas apro.

44 Paco- kaj batal-laborojn[6]
ili faris ja konstante,
por la savo de l' animoj
ĉiam same laborante.

45 Ĉiutage alĉiele
himnoj kaj preĝad' de tiuj
sonis pete pri eniro,
kaj por ili kaj por ĉiuj.

46 Dolĉa kanto de l' alaŭdo,
sur la montoj brila helo!
Kaj tra ĉiuj valoj blovis
mola vento de degelo.

47 Pacaj, esperigaj floroj
kreskis ĉe l' arbaraj randoj,
kaj ĝojigaj antaŭsentoj
iris tra la Saksaj landoj.

Traduko de la Germana poemo "Dreizehnlinden, Kapitel 2, Das Kloster" de FRIEDRICH WILHELM WEBER *(Frederiko Vilhelmo Vebero, ∗1813-12-25 – †1894-04.05) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

Arg-116-231 (2004-01-31 18:02:15)

44 Also übten sie beständig
Friedenswerk und Kampfespflichten,
Doch der Arbeit für der Seele
Heil vergaßen sie mitnichten.

45 Früh und spät zum Himmel schallte
Ihrer Hymnen und Gebete
Bange Klage, die für alle
Und für sie um Einlaß flehte. -

46 Süßer Schlag der Heidelerche,
Sonnenschein auf allen Hügeln!
Tauwind sang, durch alle Schluchten
Flog er rasch auf weichen Flügeln.

47 Friedensboten, Himmelschlüssel
Sprossen auf der jungen Aue,
Und ein frohes Frühlingsahnen
Rauschte durch die Sachsengaue.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas FRIEDRICH WILHELM WEBER *(Frederiko Vilhelmo Vebero, ∗1813-12-25 – †1894-04.05).*

Arg-116-230 (2004-01-31 00:45:13)

[6] Pacajn kaj batal-laborojn